

NU... ĜIS LA REVIDO, STEFANINO.
ĜIS, PAĈJO! ESTU ZORGEMA!
EBLE ONI NE KREDOS NIN, SE NI PREZENTAS NUR LA DESEGNAĴON DONITAN AL NI DE HINDLO.
MI FAROS MULTE DA ESPLORADO ĜIS MI TROVOS BONAN PRUVON.
LABORU BONE, PAĈJO!
JES, LASU ĈION AL MI... HIERAŬ NOKTE NI ELPUMPIS MULTE DA INFORMO EL HINDLO!
HA HA HA! NI POSEDAS TRE SEKRETAN INFORMON!
MI POVOS VENĜI MIN KONTRAŬ JOHANO, FINFINE!


ESTAS TRE FRUE, ĈU NE? KIO OKAZ...
BONAN MATENON, RAVELIN!
JEN RAVELIN!
MI JA KOMPRENAS TIUN SENTON.
HO... VI KONSTATIS, KE TIUJ DU BOLAS DE PASIO, KAJ ESTAS MALFACILE RESTI EN LA DOMEGO NUN. ĈU MI PRAVAS?
NI AMBAŬ ESTIS FORĴETITAJ DE TIUJ, KIUJN NI AMAS. ĈU NI AMIKIĜU?
SE LA RAKONTO MONTRIĜAS VERA, MI POVOS DETRUI TIUJN DU FRATOJN, CERTE!
HA! NUN VI AGAS KVAZAŬ VI ESTUS KURAĜA!
NU, KIE DIABLE POVAS TROVIĜI TIU SEKRETA ARBARO, EN KIU ŜI LOĜIS?
LAŬ TIU TAGLIBRO, SINJORO LANTOO PERMESIS, KE MIKAELINO KRESKU EN KAŜITA, TUTE IZOLITA ARBARO...
SED...


PRINTEMPO VENIS RAPIDE.
LA BIENO DE LA FAMILIO LANTOO PLENIĜIS DE FLOROJ, KIUJ DISSENDIS PARFUMON PRESKAŬ SUFOKAN.
AL MI PLAĈUS FARI ION AJN ĜIS ELĈERPIĜO! MI NE PLU TOLERAS RESTI ĈI TIE, SEN-MOVE!
HO NE! LA KURACISTO DIRIS, KE VI ANKORAŬ NE RAJTAS EKZERCI-ĜADI...
DIO MIA! MI NENIAM SUSPEKTIS, KE VI ESTUS FLEGISTO TIEL SEVERA!
HA HA HA!
JAM DELONGE MI NE AŬDIS RIDOJN EN LA FAMILIA DOMEGO.
SED, KIAL ŜI RIDAS TIOM MULTE?
SINJORETO RAVELIN... MI CERTIS, KE VI KAJ ŜI ESTIS...



BAC
ĈI TIU KVANTO SUFIĈAS, ĈU NE?
MI IROS AL LA LAGO NUN.
DANKON PRO VIA HELPO!
LASTATEMPE MIN HELPAS NEK STEFANINO NEK BIRO, ŜIA PATRO!
KOMPATINDA SINJORETO RAVELIN! VE, LI JA MATURIĜIS FULMRAPIDE!
LA BLANKFLAMA LAGO.
LA VARMO DE PRINTEMPO POVIS FANDI LA GLACITAVOLON, KIEL ATENDITE...
JOHANO KAJ MIKAELINO.
ILI PROVAS ŜAJNIGI NORMALEĈON ANTAŬ MI, SED ESTAS SENUTILE.
PIK
MI SCIAS, KE ILI AMAS UNU LA ALIAN.
VŜŜ




MIKAE-LINO...
HO... RAVE-LIN!
ĈU VI VENIS ĈERPI AKVON?
JES, JES...
MI AŬDIS, KE TRE BONAN TEON ONI POVAS FARI PER AKVO DE ĈI TIU LAGO.
JOHANO DIRIS TION AL VI, ĈU NE?


UNU TAGON, MI INSISTIS, KE MI POVIS PORTI LA SITELON DA AKVO SEN LIA HELPO.
ANTAŬE, MI KAJ MIA FRATO ESTIS TIUJ, KIUJ ĈERPIS AK-VON KUNE.
JES...
SED MI STUMBLIS, KAJ EK-PLORIS...
NE PLORU, RAVELIN, NE PLORU PLU!
NE PLI DA DOLORO, NE PLI DA DOLORO...
MIKA-ELINO...
MIKAE-LINO, MI AMAS VIN...
RAVE-LIN!
MI AMAS VIN...
... EKDE KIAM MI VIDIS VIN JE LA UNUA FOJO!
SED... KIAL?! KIAL, MIKAE-LINO?!


MIKAELINO... MALGRAŬ MIAJ PETOJ, VI NENIAM REVENOS ALMI...
MI BEDAŬRAS...
MI BEDAŬRAS, RAVELIN.
TIUJ TAGOJ, KIUJN MI PASIGIS APUD MIKAELINO...
KAJ LA TAGOJ, EN KIUJ MI ĈERPIS AKVON EL LA PUTO, APUD MIA FRATO...
ĈIUJ TIUJ TAGOJ ESTAS TRE MALPROKSIMAJ NUN.
KIAM NI TROVIS VIN EN TIU ARBARO... VI DAŬRE RIGARDIS NUR JOHANON.
EKDE TIU MOMENTO, LI JAM REGIS VIAN KORON.
JES...



MIKA-ELINO...
JOHA-NO!
VE, KION MI POVAS FARI?
ĈU VI RENKONTIS MIAN FRATON?
MI SUFERAS KIAM MI VIDAS RAVELIN-ON SUFERI.
JOHANO...
KION... KION MI FARU?
RAVELIN, PARDONU MIN...
VI ESTIS TIU, KIUN MI PLEJ VUNDIS.
MI PAROLU KUN LI TUJ.
RAVELIN...
TAMEN, MI DUBAS, KE TIO ESTOS UTILA.
FRATETO, KIU KUTIMIS SEKVI MIN AL IE AJN, KVAZAŬ LI ESTUS MIA OMBRO.


RAVE-LIN... MI ESTAS JOHANO.
ĈU VI DORMAS? MI VOLAS DIRI ION AL VI.
TAMEN MI VOLAS NEK DIRI ION, NEK AŬDI ION EL VI.
RAVE-LIN, MI PARDON-PETAS.
MI NE CELIS TROMPI VIN. MI NE AŬSKULTIS MIAN KORON DUM MULTE DA TEMPO, KAJ...
KION VI CELIS, DO?!
VI ESTAS TUTE EGALA AL NIA PATRO!
RAVE-LIN...
JES JA, VI ESTAS KIEL NIA PATRO... AROGANTA, MEMFIDA... VI ĈIAM PEN-SAS, KE VI VENKOS.


SE VI VOLAS DIRI ION AL MI, TUJ FARU TION! AGU KIEL VERA VIRO!
FORGESU ĈION. NE GRAVAS.
KION... KION VI VOLAS DIRI...?
FRATO...
PRI KIU MIENO VI PAROLAS?
NU, MI JA NE ESTAS SUFIĈE VIRECA, ĈU NE?
MI ESTAS FEBLA ULO! MI NE ESTAS KIEL MIAJ FRATO AŬ PATRO!
ĈU PRI MIENO MISFORMITA DE ĴALUZO?
NE DIRU ION TIAN. KAJ NE FARU TIUN MIENON!
BONVOLU ĈESI JAM!
KIO?!
MI EĈ NE SCIAS KIAL MI ESTAS ĴALUZA! VI NE ESTAS TIU, KIUN ŜI AMAS, FRATO!
RAVELIN...


ŜI AMAS LA KOPION DE NIA PATRO! JEN LA VERO!
MIKAELINO AMAS NUR GUSTAVON, NIAN PATRON.
KIO OKAZAS? VI PALIĜIS. ĈU VI EKPENSIS, KE MI PRAVAS, FRATO?
BAC
FIULO! IRU INFEREN!
VI ASPEKTAS SIMILA AL NIA PATRO. TIAL ŜI ŜAJNE AMAS VIN, FRATO.
MI KAPABLAS LUKTI NUN!
MI NE ESTAS TIA, KIA MI ESTIS ANTAŬE, JOHANO!
KIEL IO TIA POVUS ESTI VERO?
ĈU MIKAELINO AMAS MIN ĈAR ŜI VIDAS MIAN PATRON EN MI? ĈU TIO ESTAS LA KIALO?
ĈU LI DIRAS VERON, DO?


BAC
VI DU ESTIS TIOM BONAJ UNU KUN LA ALIA! VE... KAJ NUN VI INTERBATAS!
ĈESU! BONVOLE ĈESU!
SINJO... SINJO-RETOJ!
KION VI FA-RAS?!
SE TIO ESTAS VERO... MI ES-TAS PLI TRANK-VILA NUN.
HA... ĜUSTE!
PARDO-NU, KE NI ĈAGRENIS VIN.
HO, NE PLORU, LAŬRA!
NI FARIS LUKTO-LUDON. ĈU NE, RAVELIN?


RAVELIN...
JOHANO...
FRATO, MI VOKAS VIN ELKORE, SED...
TIUJ DU FINFINE INTER-BATIS!
CETERE, MIA PATRO PLENUMIS SUKCESAN ESPLORA-DON! MI TRE ANTAŬĜOJAS TION, KIO OKAZOS SEKVE!